AMERIKA ESPERANTISTO — AMERICAN ESPERANTIST

La Monata Bulteno de la Esperanta Asocio de Norde Ameriko — The Monthly Bulletin of the Esperanto Association of North America

Joseph R. Scherer, President, Los Angeles, California — Ernest G. Dodge, Ch.Ex.Comm., Washington, D. C.

Joseph Leahy, General Secretary

Centra Oficejo — 1410 H Street, N-W., Washington, D.C. — Central Office

Vol. 55, No.1, 10c per copy-anywhere $1. per year November 1940


* * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

THE FIRST "TUTAMERIKA NUMERO". The "All American"Esperanto magazine makes its bow! What our members and subscribers are receiving in this envelope is the November, 1940 number of "Amerika Esperantisto",(it was planned as the October number, and even so labeled, but unforeseen obstacles occasioned last minute delay.) At the same time it is the current number of the "O Brasil Esperantista", of the "Argentina Esperantisto", and of the "Kanada Bulteno". The picture forming the heading, showing as it does a green star in lovely hands, shedding light upon the whole Western World, was designed and produced solely for use in joint issues of the New World Esperanto magazines. Throughout the several countries, 2,100 copies in all of this issue will be distributed and read.
This one-sheet supplement in English is added along with the"TUTAMERIKA NUMERO"to give our EANA members a few current items of news local in nature. For the share contributed by EANA to the TUTAMERIKA NUMERO, see pages 4,5,6, and part of 11.It was realized by our office that the article on Esperanto in Hollywood--though containing some material wholly new--is in part a story already familiar to our readers in Usono. But its interest to the readers of other American countries was ample reason to dictate its inclusion.
"In cooperation there is strength". If the reception of this first joint issue of the New World organs of our movement is hearty and favorable, it is hoped to have a second "TUTAMERIKA NUMERO" some time this coming winter.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

ESPERANTO SOCIETY of DETROIT. At their annual meeting October 3, the following officers were elected for the year 1940-41: President-Joeseph H.Murray, 5935 Cherokee Ave., Dearborn, Mich., Route #1. Vice Pres., Mrs. Robert L.Davis. Secretary-Robert L.Davis, 4321 Fourth Ave., Detroit. Treasurer- Edwin Sievers, 2016 West Alexandrine Ave., Detriot,Mich. And their first act of business was to send Patrono check for $10. to EANA for year 1940-1941.--This is a splendid example for other clubs-all the club members 'chipping'in only a small amount to make up the X, instead of an occasional one paying the large amounts-necessary to keep the good ship Esperanto on an even keel.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

NEW CLASSES NOW BOOMING ALONG. Grand Forks, No.Dakota--Mrs Rita Beukema Nuss, 2111 University Ave., Roosevelt Jr. High School, Westfield, N.J.--George W.Wimmer. San Diego, California,-Mrs. Georgine C.Molnar, 3485 Olive St..

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

ANOTHER OLD MEMBER PASSES AWAY. A postal card reached us the 23rd, from the postmaster of Halcyon, California,saying:" mail undeliverable-reason, deceased".(No date or details) re. mail addressed to one of our old members-Edgar Cheetham.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

THE ABOVE IS TYPICAL. In many cases of death of members, we get such 'curt' information--sometimes members write in asking why we made no mention of the "late brother"(but no name) We have to write to find out, who the 'late brother' was, why and when and what made him 'late'? When name is given, dates and other details are omitted. Often people who had known the deceased write us for information.It is somewhat embarrassing not to be able to give it. The excuse for not giving the information is usually:"I thought someone else had given it".

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

"BAHA'I YOUTH" for October carries the English and Esperanto versions of Dr. Zamenhof's "Prayer under the Green Ensign". Each issue of this magazine carries an Esperanto feature.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

Mrs.THOMAS GOLDMAN. conducts Esperanto classes Wednesday and Friday evenings in the Georgetown Public Library-Wisc. Ave., at Reservoir St., N-W, Washington, D.C.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

DO NOT FORGET FOR A MOMENT, THAT OKLAHOMA CITY ESPERANTISTS ARE CALLING YOU TO 34th CONGRESS

**IN MEMORIAM, HORATIUS BONAR HASTINGS.** The death, in Saugus, Mass., on September 24, of a well known white haired and patriarchal figure deprived Esperanto of one of its most devoted disciples. A man of singularly simple and lovable character, he left behind many friends in various places, here and abroad, who count his passing as a personal bereavement. From 1932 to 1936 in Washington, D.C., he was the "elder statesman" of all local Esperanto activities during the time when the responsibilities of the national office of EANA were transferred to that city. He personally is the one responsible for devising the plan under which the Esperanto Club of Washington has been able to make available to Esperanto beginners in America 3,000 copies of a special American edition of the "Esperanto Home Student", written by James Robbie of England. Soon after the publication of the complete Esperanto Bible, Mr.Hastings read the Bible entirely through, with his keen proof-reader's eye, and called the attention of the publishers to all even the smallest typographical errors--such as an occasional broken type--which might be guarded against when there should be need for a second edition.

Outline facts of his life are given below in his own words, written on a postcard to a friend in Washington as far back as last April, when the necessity for a serious operation made him feel that perhaps his days here might be drawing to a close.

" Kara Amiko: ( April 5/40)

" Mi skribas el lito de Lynn (Mass.) Hospital kie mi kuŝis dum du semajnoj. En la okazo ke mi ne resaniĝus, jen kelke da detaloj, kiuj vin eble interesos.---"Nask. Aŭg.31,1861 Providence R.I., filo de konata pastro kaj aŭtoro H.L.Hastings. Ĉeestis publikajn lernejojn en Boston kaj alie. Universitato Harvard A.B. 1891, A.M. 1893. Universitato Gottingen, Ger., 1889-90. Ĉe la aĝo de 7 jaroj komencis lerni la presarton en la oficejo de sia patro. Instruis en Texas, kie li faris 700-mejlan vojaĝon en "koverta vagono" kun edzino. Redaktis religian gazeton dum 28 jaroj en Boston. Esperantiĝis 1923, sub D-ro D.O.S.Lowell,(LK).Instruis la unuan Esperanto-klason en parlamentejo, Washington,D.C. --Ankaŭ kvin aliajn klasojn tie. Ano de redakta kaj financa komitatoj de EANA. Instruis klasojn sub State University Extension ĉe Harvard Universtato.-- H.B.Hastings."

Among the younger and new generation of Esperantists, may there be many who will light their torch from a torch such as was his and who will always "carry on". The following is an appreciation contributed by George Winthrop Lee, President of the Boston Esperanto Society:

" 'A gentleman and a scholar', is a label for Mr.Hastings that nobody would question. He was all of that and a good deal more, which because of his modesty we did not begin to realize until he returned to us after his several years in Washington. He was secretary of the Boston Esperanto Society for a few years before he was obliged to turn the responsibility to the assistant secretary because of illness. As secretary and as instructor of Esperanto in the State University Extension courses, he made his importance to us most decidedly felt. Scholarly, accurate, reminiscent, friendly, patient, he was an inspiration to his associates and to his pupils. But we took him so much for granted as a fixture in our group, a permanent asset, that it will be hard to reconcile ourselves to being without so much that he stood for. And what Boston could say of him must represent what Washington, even more, could say of him; for I understand that his mission there meant the invigoration of the local group, with added numbers from the very many who were privileged to be in the numerous courses that he conducted in the years that he was with you--years when we were eagerly hoping for his return to Boston."--George Winthrop Lee.

SO PASSETH ONE WHO WILL NEVER BE FORGOTTEN BY THOSE WHO KNEW HIM WELL.

THE MASS.,BULLETIN OF THE DEPT. OF EDUCATION ANNOUNCING personel and course being taught in the State University Extension Center in Boston, gives considerable space to Esperanto with synopsis of its place in Commerce, Science, Literature and Education.--As noted above Mr.Hastings had been the teacher of Esperanto classes.

ESTU PRETA posters are being made good use of by Fervorulino Eliza Emery Smith of Elmira, N.Y. She is having them posted up in almost every public building in her city--and is also sending them to nearby schools and colleges. She is very proud of her Esperanto class.

CAUSE FOR REJOICING. A letter from Warsaw, Poland, dated Sept. 24, from Lydia Zamenhof to H.Jakob of Geneva, Switzerland, was relayed to Frato Edwin Sievers of Detroit, in which she states that no news of Adam Zamenhof since January, his wife and son are living in Warsaw. Her health is good. Difficulty with correspondence, and food shortage. Little detail.

L E A R N E S P E R A N T O by C O R R E S P O N D E N C E. BEGINNERS and ADVANCED. Instructor licensed by EANA as teacher. Address:
ESPERANTO-BY-MAIL, ST.ALBANS, N.Y.





# O BRASIL ESPERANTISTA


*ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.*

Número 31-33 — Redator responsavel: Dr. Carlos Domingues: Julho-Setembro 1940

Administração e redação: Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro. Brasil.


# STATISTIKO KAJ ESPERANTO

La BRAZILA INSTITUTO DE GEOGRAFIO KAJ STATISTIKO, departemento senpere dependanta de la Prezidanto de la Brazila Respubliko, kiu antaŭ du jaroj akceptis Esperanton kiel sian helplingvon, ĵus eldonis belegan 32-paĝan broŝuron titolitan "Statistika Resumeto", kiu baziĝinte sur la elementoj liveritaj de la statistiko rilata al 1938 sin destinas al la disvastigo de nombraj informoj pri la diversaj aspektoj de la brazilaj realaĵoj. Multe pli detala ol la antaŭa eldono rilata al la jaro 1937 ĝi estis presita sur luksa papero de la Instituta Presejo. Ĝin ilustris portreto de Lia Moŝto D-ro Getulio Vargas, prezidanto de la Brazila Respubliko. Ĝia antaŭparolo, kiu estas subskribita de d-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la Instituto kaj direktoro de la Statistika Departemento de la Ministrejo por Edukado, estas


RESPUBLIKO DE LA UNUIGITAJ ŜTATOJ DE BRAZILO

BRAZILA INSTITUTO DE GEOGRAFIO KAJ STATISTIKO

Prezidanto — Ambasadoro J. C. DE MACEDO SOARES

STATISTIKA RESUMETO

(EKSTRAKTITA EL LA BRAZILA STATISTIKA JARLIBRO, JARO IV - 1938)

★

RIO DE JANEIRO
PRESEJO DE LA INSTITUTO
1940

valora atesto pri la efika propagando de Brazilo pere de Esperanto. d-ro Teixeira de Freitas estas malnova esperantisto, kiu jam multe laboris por la disvastigo de Esperanto. Kiam li estis direktoro de la Statistika Departemento de Ŝtato Minas Gerais, li uzadis Esperanton por ĝia korespondado eksterlanden.

La prezidanto de la Instituto, ambasadoro d-ro J. C. Macedo Soares, kies valoraj servoj faritaj al Esperanto jam estas tre konataj de la tutmonda esperantistaro, skribis al la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista leteron, el kiu ni transskribas la jenan frazon: "Profitante tiun taŭgan okazon mi sendas al vi, en la nomo de tiu ĉi Instituto kaj en mia propra nomo, la esprimon de nia plej varma danko pro via konstanta kunhelpo al niaj laboroj, same kiel pro via netaksebla kunlaborado ĉe la disvastigo eksterlande de brazilaj aferoj."

## ANTAŬPAROLO

Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, duafoje, prezentas la esperantan tradukon de resumeto de sia "Brazila Statistika Jarlibro", destinata al la disvastigo de nombraj informoj pri la diversaj aspektoj de la naciaj realaĵoj. Kiel antaŭe okazis, la statistikaj elementoj rilataj al Brazilo, tutkune konsiderataj, estas prezentataj kompare kun tiuj de la Federacia Distrikto.

La iniciato de la Instituto pri la uzado de Esperanto, kiel ilo de disvasti-

# UNUECO DONAS FORTECON

"Unueco donas fortecon": jen frazo, kiun ĉiu rediras kun plena konvinkiteco, sed kiun ĉiu, kun tuta konscienco, kontraŭdiras.

En ĉi tiu funebra horo de nia malfeliĉa planedo, kiam ni vidas, ĉiam ankoraŭ, la refariĝon de okazoj, kiuj vere ĉagrenas la korojn sentemajn; kiam ni atestas la frakasantan perforton kontraŭ la trankvileco de hejmoj; kiam la ĉielon skuegas eksplodoj, tiun saman ĉielon, kie ŝvebas revoj plej dolĉaj pri sorto pli bona de la homo; en ĉi tiu kriza momento, ni, civitanoj de la mondo, rifuĝas en la sanktejon de nia amo al la homo — al nia kompatinda frato, filo de nia komuna, nun malgaja Patro.

En la mallumа nokto, kiun ĉiu nunmomente travivas, povas heligi nian vojon nur la radio de tiu amo. Nur ĉi tiu estas forta, ĉar ĝi estas eterna; kaj ĝi estas ja ĉiamdaŭra pro tio, ke ĝia Fonto estas neelĉerpebla. Ni ne ĉesu petadi al tiu Fonto, ke almenaŭ gutojn ni ricevu: la miraklo pri la multobligo de panoj kaj fiŝoj refariĝos, kaj tiuj gutetoj, ŝprucante el niaj koroj, estos riĉa pluvo fluanta de fontano ĉiam viva, estos freŝa roso sur sekan grundon, estos gajaj fajraĵoj en nigra nokto, estos kuraĝigo en malespero, estos vivo forpelanta la morton.

"Unueco donas fortecon": ni tion rediradu konvinkite; sur tiu absoluta konvinkiteco ni fondos la konstruaĵon de la Paco. Ni unuiĝu, t. e. ni iĝu unu penso, unu homo, ne por subskribi kontraktojn de iuj kontraŭ aliaj, ne por defendi iajn apartajn propraĵojn, siatempe eltiritajn el pli malfortaj manoj, ne por avidi materiajn havaĵojn, kiun ni solaj ne kapablus ekposedi; ni unuiĝu, sed ĉiuj kune, "ĉiuj por unu". Kiam tiu unuiĝo okazos, tiam estos ĉiuj unu sola grandega maso, obeanta la leĝon pri la universala altiro kaj, tial, nekontraŭstare — pli bone, tute volonte — sin movanta rapide al la granda Magneto de la Universo. En konfuzo, nenio estas realigebla. La Universo naskiĝis el la ĥaoso, kaj ni estu certaj, ke al tiu stato ĝi neniam plu revenos. Kial, do, ni volas ĵeti ĝin en abismon pli nigran ol la iama? Infana deziro, ĉar la universaj leĝoj ne estas preterlaseblaj.

Ĝuste kun la sento plej profunda kaj sincera pri la nepra bezono de unueco ni eldonas ĉi tiun numeron de nia bulteno. Ĝi havas la kunlaboradon de ĉiuj bonvolaj homoj de Ameriko, de ĉi tiu kontinento nomata "Nova Mundo", kie la mondo esperas, ke nova spirito naskiĝos kun la evangelio de Amo, aŭ, pli bone, kun forto por enblovi en la korojn freŝan venton, kiu revivigu la estingiĝantan Amon, konsilatan de la supera Predikanto: kaj mi diras ja "Predikanto", ĉar Lia parolo estas eterna.

Tiun parolon ni klopodu por kompreni; tiam, ĉio estos alia. Ni komprenu ĝin, por kompreni nian fraton. Kaj la tagon, kiam ni komprenos la homon, ni lin amos, kaj ni amos Dion. Ni tenu en la koro la profundajn vortojn de iu filozofo: "amo estas kompreno; nur la kompreno naskas la veran amon." Esperanto estas kreita kiel provo de homa interkompreno ne nur lingva, sed ankaŭ spirita; ni ĝin ne forlasu, tiun kompason en netravidebla mallumo; ĝi nin certe orientos al la supera Celo; per ĝi ni komprenos kaj amos la Homon: kaj tio sufiĉas, ĉar tio estas la tuta demando de la vivo kaj ties sola motivo.

L. de Montijo

---

gado, en la tuta mondo, de tiu malgranda resumeto de la brazila statistiko, estis akceptata kun la plej viva simpatio. Kaj la atentmovo, kiun ĝi kaŭzis, ĉe la tutmondaj esperantistaj centroj, pri la brazilaj aferoj, bone pravigis la saĝon de la faritaĵo, profite de pli granda disvastigo, ĉe la civilizitaj popoloj, de la vivkondiĉoj kaj de la grado de materia kaj morala progreso de la brazilanaro.

Tiomaj kaj tiel kuraĝigaj estis la rezultatoj de l' dissendado de la "Statistika Resumeto" responda al la "Jarlibro" de 1937, ke la Nacia Konsilantaro de Statistiko, rekoninte la ĉiam kreskantan progreson de Esperanto, ĉar ĝia parola kaj skriba uzado pli kaj pli disvastiĝas tra la tuta mondo, ĝin akceptis kiel helplingvon ĉe la aktiveco kaj publikaĵoj de la Instituto kaj, poste, enmetigis ĝian instruadon en la programon de la Perfektiĝa Kurso kreita por la oficistoj de la centraj statistikaj departementoj en la brazilaj Ŝtatoj.

Tiel, samtempe, kiam ĝi sin turnis al Esperanto por pli granda efiko de siaj disvastigiloj, eksterlande, — la Instituto instigadas, sisteme, la disvastigon de tiu lingvo meze de la profesiistoj de la Brazila Statistiko kaj tiamaniere servas al la altaj idealoj de homa solidareco, laŭ kiu estas inspirataj la esperantistoj ĉe sia laboro de plifortigo de la spirito de reciproka kompreno inter la bonvolemaj popoloj.

*M. A. Teixeira de Freitas*

Ĝenerala sekretario

---

# La Universala Frateco

*Poezio, kiu ricevis la 1an premion en la literatura konkurso de l' Sesa Internacia Kongreso de Esperanto, Washington.*

Sur ondegoj malpacemaj
De profunda, nigra mar',
En ŝipet' iras sentime
Plej kuraĝa maristar'.
Estas tero malproksima,
Ocean' montriĝas nur;
Sur akvaro la senlima
Ne briletas ja lumtur'.

Kaj la nokt' estas malhela,
Sed ŝipet' antaŭen iras
Sub ĉiel', arkaĵ' senstela...
"Kien iras vi, ŝipistoj,
Sur dezerta l' ocean'?
Ĉu la morton vi ne timas
Pro koler' de l'uragan'?
Kien iras vi, bravuloj,
Kion, fratoj, celas vi?
Nur riferoj, ne insuloj
Ja troviĝas tie ĉi."

Kaj de l' vento forpuŝata
La ŝipet' antaŭen iras
Sur akvaro la malglata.

"Niajn hejmojn forlasinte
Ni foriris el Patruj'
Al haveno ni vojaĝas;
Ĝi aperos, certe, tuj...
Ke ĉiel' bela fariĝos,
Kaj ne estos plu danĝer',
Ke la maro trankviliĝos
Nin certigas la esper'."


Ventoj ĉesas. En ĉielo,
Inter nuboj, tremetante,
Ekbriletas luma stelo...

Al ŝipistoj nun similaj
Ni laboras kun fervor',
Ĉiujn barojn ni faligos
Nur kun amo en la kor'.
La espero nin protektas,
Dum vojaĝo regas ĝoj',
Verda Stelo nin direktas
Tra la tuta longa voj'!

Al laboro, kolegaro!
Ni daŭrigu, kuncelante
La Fratecon de l' Homaro.

J. B. Mello Souza.

# Monumento de Carlo Bourlet



CARLO BOURLET

El la grandaj nomoj, kiuj plenigas la internacian galerion de esperantistoj, ne estas favoro meti sur ĝian frunton tiun de Carlo Bourlet, notinda kaj fama franca matematikisto.

Naskiĝinte en Alzaco Bourlet sin deklaris franco, kiam tiu ĉi provinco ankoraŭ estis sub la germana superregado.

En Parizo Bourlet akiris grandan kaj respektatan nomon en la mondo de la matematikistoj kaj, poste, en la esperantista mondo.

Dank' al sia escepta influo ĉe la Librejo Hachette povis Bourlet ludi eksterordinaran rolon ĉe la monda disvastiĝo de la artefarita lingvo kreita de Doktoro Zamenhof. Se ne estus li, Esperanto certe ne estus atinginta la progresadon, kiun ĝi facile atingis.

Dum la unuaj tempoj de la internacia lingvo la ago de Bourlet estis ĉiuspeca. Inteligenta, brilstila, aktiva, li samtempe laboradis ĉe la gazetaro, ĉe la tribuno, ĉe la katedro, ĉe la internaciaj kongresoj, fine ĉiel.

Mi konis lin en Dresdeno, okaze de la Kvara Universala Kongreso de Esperanto, kiun mi ankaŭ ĉeestis. Lia nigra barbo, lia duona senharaĵo, lia bone tranĉita redingoto, liaj elegantaj manieroj, faris lin konata de ni ĉiuj.

En Parizo, tuj poste, ni fariĝis amikoj. Mi eniris en lian hejmon, en tiun francan hejmon, ĝenerale fermitan al la fremduloj. Pere de Bourlet mi konis la meztipan, burĝan francan familion, tiel malsaman ol tiu nemorala, frivola, pri kiuj rakontas certaj romanoj.

Mi vizitadis la Parizan Grupon, kiun li prezidis. Al li mi ŝuldas la nediskuteblan sukceson de parolado, kiun mi faris ĉe la Societo de Geografio de Parizo, sukceson ne ŝulditan al miaj tre malgrandaj meritoj, sed al ĝia temo — Brazilo kaj al la lingvo, per kiu mi alparolis al la multenombra publiko, kiu plenigadis la vastan salonon de tiu Societo. La lingvo, kiun mi uzis, estis tiu, de kiu Bourlet fariĝis apostolo — Esperanto.

Rememorigoj el tiu fora tempo alvenas al mia cerbo, kiam mi ricevis la volumon, en kiu la sindono de la nelacigebla Ismael Gomes Braga kolektis kelkajn el la artikoloj titolitaj *Babiladoj*, per kiuj li ĉarmis la multenombrajn legantojn de la fama *La Revuo*, eldonita de la Librejo Hachette.

Ilin relegante venas al nia penso la tiutempa Bourlet: siblanta, per eleganta kaj malpeza stilo pritraktanta la plej diversajn temojn.


Ismael titolis la libron: *Monumento de Carlo Bourlet*. Feliĉa, delikata kaj elvoka titolo, kiu tradukas la senton de la eldoninto, unu el la plej diligentaj kaj kompetentaj brazilaj esperantistoj.

Kiel *finrorto* mi diras tion, kion multaj braziloj ne scias: ke Carlo Bourlet mortis, kiam li estis ekveturonta al Brazilo. Mi sukcesis, ke la Politeknika Lernejo kaj la Klubo de Inĝenieroj kotizis por pagi lian traveturadon tra la Atlantiko. La celo de lia vojaĝo estis fari tie ĉi serion da paroladoj pri matematiko kaj grafostatiko, pri kies fako li estis nediskutebla majstro.

Li ne povis tion fari pro tio, ke, ĝuste en tiu momento, li estis, neatendite, falĉita de la Morto, en la plena forto de sia vireco.

*Everardo Backheuser*

## FILATELIO KAJ ESPERANTO




*Kliŝo de la verdkolora stampo kun vortoj en Esperanto memoriga de l' Jarcento de la Poŝtmarko uzita dum la Unua Regiona Filatelia Ekspozicio en Belo Horizonte, Ŝtato Minas Gerais,* (14-21 de Julio 1940), *organizita de la "Filatelia Societo de Minas Gerais." — B. L. E. donacis kelkajn librojn kiel premiojn.*

# Esperanto en Ŝtato Pernambuco



*S-ro ODILON VIDAL DE ARAUJO*

*Portreto de la klera kaj sindona samideano S-ro Odilon Vidal de Araujo, sekretario de "Pernambuka Esperanto-Asocio", kaj direktoro de "Pernambuco Esperantista", kies nekrologon ni aperigis en nia antaŭa numero. Tiu Asocio eldonis specialan numeron de sia organo tute dediĉitan al tiu kormemora samideano.*

## RIMRAKONTO

**J. Matos Quinaud**

*(Al la plej bona amiko, kiun mi renkontis en Esperantujo).*

**I**am mi trovis, antaŭ ses jaroj,
**S**ur mia tablo karton de Homo.
**M**i ĝin legis. De tiam mia domo
**A**erumiĝis per goj' kaj bonfaroj.
**E**terna Suno, Suno de l' Espero,
**L**umigis mian vojon sur la Tero.

**G**ravan sciigon li sendis al mi,
**O**don pri la verko de homa geni',
**M**ajstran priskribon, kiun mi legis tuj.
**E**stre detale min rakontis li
**S**onĝon helan ĉirkaŭ Esperantuj'.

**B**aron ne evitas lia akcelo,
**R**ekte li marŝas al la Vera Celo,
**A**rde revas li pri la Sankta Faro: —
**G**randan benon venigi je la Homaro,
**A**l ĉiuj brili nia Verda Stelo!

## TEKNIKO KAJ ESPERANTO

*En la fino de Julio lasta okazis en São Paulo la dua Brazila kunveno de Inĝenieroj. Laŭ propono de nia klera samideano el Belo Horizonte, d-ro Aristoteles Juvenal de Faria Alvim, oni decidis la enkondukon de Esperanto, flanke de la angla, franca, germana, hispana kaj itala lingvoj, en la Teknikan Terminaron, kiun organizos Komitato baldaŭ elektota.*

*En nia proksima numero ni publikigos la tekston de tiu propono.*

*Niajn plej varmajn gratulojn al d-ro Faria Alvim pro lia brila venko!*

# AMERIKA ESPERANTISTO

*MONATA BULTENO DE LA ESPERANTO — ASOCIO DE NORDA AMERIKO*
1410 H. Street, N-W. Washington, D. C. Usono.
October 1940.

**Paramount Filmfarejo diras:**

## "Esperanto estas plej kantebla lingvo"

La kinejvizitantoj okaze de la "Premiero" (unuafoja montrado) de nova filmo kutime ricevas luksan programon kun multaj ilustraĵoj kaj detalajoj pri la filmo. Tian multpaĝan programon kutime ricevas ankaŭ la ĵurnalistoj kiuj eĉ pli frue vidas ĉiujn filmojn.

Kiam mi iris por vidi unuafoje la filmon "Vojo al Singapuro" ni ĵurnalistoj ricevis speciale luksan programon kaj kiam mi malfermis ĝin mi havis tre agrablan surprizon. La unua paragrafo de tiu programo diris en angla lingvo:

*"Esperanto estas plej kantebla lingvo. Esperanto estas facile PAROLEBLA kaj laŭ la diro de Bing Crosby, Dorothy Lamour, Bob Hope kaj 200 geinsulanoj la universala lingvo estas ankaŭ mirinda por kantado. Vi aŭdos la unuan Esperantan kanton iam kantatan en filmo en "La Vojo al Singapuro". Kajgun estas la nomo de la kanto kaj de la insulo..."*

Jen estis vortoj pri Esperanto kiujn devis legi ĉiuj ĵurnalistoj kiuj skribas pri filmoj por la gazetoj kaj revuoj de Usono kaj de multaj fremdaj landoj.

Kiel mi jam klarigis en pli frua artikolo, Paramount Studio deziris krei imagitan insulon por eviti diversajn kritikojn. Du usonaj riĉuloj, (Bing Crosby kaj Bob Hope) filoj de milionuloj, forkuris de la monotona amuzado inter la riĉuloj de Nov Jorko kaj fuĝis al tropika romantiko, kun la firma decido ne plu eĉ rigardi virinojn. Okazas multaj amuzaj scenoj kaj surprizoj sur tiu insulo. Unu el tiuj surprizoj estas ekzotike belega sudmar-insula ĉarmulino (Dorothy Lamour). Por eviti kritikojn de iu insula aŭ kolonia registaro ke iuj scenoj estas "ofendo al la nacia honoro" ktp. ktp. la filmfarejo simple decidis uzi neniun konatan lingvon, kaj neniujn specialajn kostumojn kaj kutimojn.

Tiel okazis ke la insulo nomiĝis "Kaigoon" (Esperante: Kajgun). La kostumoj kaj kutimoj povis facile esti miksataj, sed kion fari pri la lingvo? Iuj estroj de la filmfarejo proponis silaban miksaĵon eĉ en la kanto kreita por la festmanĝo kaj dum la ceremonia geedziĝa festdanco de la brunhaŭtaj insulanoj.

Sed Johnny Burke, la fama usona kantverkisto, proponis la uzon de Esperanto en la ĉefa kanto kaj la responda direktoro Harlan Thompson konsentis al tiu ideo. Ambaŭ meritas la dankon de la samideanaro tutmonda.

Ĉar la fama kantverkisto ne tute bone konis nian lingvon, la Paramount Studio venigis min por helpi en la verkado de la originala Esperanta teksto.

*Bing Crosby kaj Dorothy Lamour ambaŭ lernis kanti la Kajgun-kanton,* kaj la filmfarejo eĉ faris fotografaĵon kiu montras kiel mi instruis la tekston al la du famegaj filmsteloj. Bedaŭrinde en la finpreta filmo ili ne kantas tiun kanton. Sed ni ne plendu. "Vojo al Singapuro" estas por ni tamen unu plia sukceso.

200 *belegaj insulaninoj kaj brunhaŭtuloj kantas en Esperanto en Paramount-filmo!*

Unua Esperanto kanto en grava filmo!


Tio en si mem estas grava reklamo por ni eĉ se la ĉefaj steloj mem ne kantas en nia lingvo. Ekstere de la kanto la insulanoj preskaŭ neniam parolas inter si. Kiam ili parolas entute estas angle kun la du usonaj filoj de milionuloj.

Ni menciu niajn Hollyood-sukcesojn en ĉiuj reklamaj kaj propagandaj klopodoj. Ne gravas ke ili estas nur komencaj sukcesoj. Se ni estas bonaj propagandistoj nia skribado kaj parolado pri la sukcesoj faras pli multe da reklamo por Esperanto ol la filmoj mem. La plej multaj kinejvizitantoj ne scias ke Esperanto estas uzata. Do la filmo mem havas nenian reklaman valoron. Estas nur nia parolado kaj skribado pri tiu fakto kiu povas kapti novajn lernantojn.

*Ni ne rajtas postuli filmojn tute en Esperanto.* Tia filmo kaŭzus nur kolosan financan perdon al la filmfarejo. Tion komprenas ĉiu praktika homo. Dume ni devas montri ke la uzo de Esperanto eĉ en malgranda skalo *alportas reklamon al la filmfarejo kaj al la filmo.* Ju pli ni tiel klopodas, des pli ni faras reklamon por nia afero.

La vojo al la ĝisnunaj sukcesoj estis longa kaj multekosta. Mi uzis milojn da horoj por sen ia mona rekompenco varbi por Esperanto en Hollywood. Eĉ nun por ĉiu horo kiun mi laboras kiel "teknika konsilanto" mi laboras dek horojn senpage varbante por Esperanto inter la filmeminentuloj.

Nia celo estas ankoraŭ 9 1/2 kilometrojn for de ni. Ni nur marŝis duonan kilometron proporcie. Jen estas mezurataj la unuaj sukcesoj laŭ ilia relativa propaganda valoro por Esperanto inter la vasta publiko; eble vi donus al ili aliajn valorojn:



*S-ro JOSEPH R. SCHERER, Prezidanto de "Esperanto-Asocio de Norda Ameriko" kaj aŭtoro de la konata libro "Ĉirkaŭ la mondon kun la Verda Stelo".*

metrojn sur nia vojo:

1928 — *Fred Niblo, fama reĝisoro de M. G. M.* rekomendis Esperanton por la tiam tute novaj parol-filmoj. Fotografaĵo de tiu intervjuo kaj liaj vortoj aperis certe en pli ol 1000 ĵurnaloj ĉar alvenis 500 eltondaĵoj .... 2 m

1929 — *Carl Laemmle, tiama Prezidanto de Universal Studio,* faris simile favorajn rekomendojn okaze de intervjuo. Fotografaĵo kaj la intervjuo aperis en 50 lingvoj en ĉiuj mondpartoj (Vidu la bildon en la libro "Ĉirkaŭ la mondon kun la Verda Stelo") . ........... 5 m

1930 — Fotografaĵoj de miaj intervjuoj kun John Boles kaj Lupe Velez aperis en granda nombro da revuoj . 2 m

1930 — *Paramount - Novaĵfilmo kun 3-minuta Esperanta konversacio* inter s-ino Chomette kaj s-ro Hetzel en Nov Jorko . . . ............... 10 m

1938 — *M. G. M. faris* 1 1/2-*horan filmon "Idiot's Delight"* kun Clark Gable, Norma Shearer kaj multaj Esperantaj frazoj . . . ........ 100 m

1939 — *R. K. O. uzis Esperanton* en 1-hora filmo "Conspiracy". Ĉiuj afiŝoj kaj kelkaj vortoj estis en Esperanto .. 50 m

1939 — *M. G. M. faris la filmon "Virino de la Tropiko"* en kiu pro bonŝanco neantaŭvidite uziĝis du vortoj ..... 5 m


1940 — *Paramount Studio enmetis Esperantan kanton* en la 1½ horan filmon "Vojo al Singapuro" kun Dorothy Lamour, Bing Crosby kaj Bob Hope . . ........... 200 m

1940 — *Paramount-Studio denove uzis Esperanton* en la filmo "Victory" kun Frederic March ktp. . . ........... 50 m

Si vi adicias niajn sukcesojn, vi vidas ke ni veturis nur 426 m sur nia 10-km vojo. Eble dek pliaj grandaj filmoj helpos al ni marŝi la duonon de nia vojo al la fina sukceso. Ni ĝin atingos nur se ni entuziasme, saĝe kaj nelaciĝante laboros, varbos kaj propagandos.

Certe vi jam legis la tekston de la Kajgun-kanto.

La virinoj kantas tre melodie, malrapide kaj klare. Sed la viroj kantas



*S-ro Clarence Brown, direktoro de "Metro-Goldwyer-Mayer", salutas la esperantistaron.*

terure rapide kun tambura batado. Pro tio estas necese antaŭe parkere lerni la vortojn. Esperanto ja ne estas ekzercilo por komencantoj sed devas servi kiel aliaj lingvoj, eĉ en tre rapida kantado.

Denove mi petas ke la legantoj sendu kiel eble plej multajn gratulojn al la direktoro Harlan Thompson kaj al la ĉefcenzuristo S-ro Luraschi. Se vi demandas kial Esperanto ne pli rapide progresas, mi devas respondi: ĉar tro multaj Esperantistoj ankoraŭ ne lernis agi kune, en tre gravaj momentoj kiam tia kunlaboro estas urĝa. Mi kredas ke ĉiu sincera samideano kiu vere volas helpi povus oferi la salajron de duona tago en ĉiu jaro por aĉeti poŝtmarkojn kaj paperon por skribi leterojn al tiuj ne-Esperantistoj kiuj helpas al nia afero.

Dume ni neniam forgesu ke estis la *Paramount Studio* kiu donis al ni la unuan gravan Esperantan kanton en grava filmo. Kaj estis tiu kanto kiu montris al la filmeminentuloj ke Esperanto estas plej parolebla kaj plej kantebla lingvo.

JOSEPH R. SCHERER,
*Prezidanto de Esperanto-Asocio de Norda Ameriko.*

——:——

EĤOJ DE LA KONGRESO DE E. A. N. A.

La Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (nun ĉefe usona organizo depost la fondado en 1935 de aparta Kanada Esperantista Asocio) festis sian 33-an jaran kongreson en la urbo Lima, (usona elparolo, "lajma"), ŝtato Ohio. La dato, julio 4-7, 1940. Pro diversaj kaŭzoj, la nombro da partoprenintoj estis iomete malpli granda ol kelkfoje en la pasinto; sed la spirito de gefrata samideaneco estis tre evidenta; kaj oni parolis nur plenkuraĝe kaj alvoke pri la nuna grava respondeco de l' samideanoj en lando ankoraŭ paca kaj libera.

Oni priparolis la fakton ke, pro la angora tempo de l' granda milito, nun devos aŭ malaperi aŭ suferi interrompon pluraj antaŭe viglaj fakĵurnaloj nialingvaj; ekz., en la kampoj scienca kaj literatura. Oni esprimis fortan esperon ke la plano por aperigo, plurfoje en ĉiu jaro, de "tutamerika numero" de la novmonda Esperantista gazetaro, havos grandan sukceson, kaj — ke tiuj tutamerikaj numeroj povos enhavi fakojn por novmonda literaturo kaj por novaĵoj pri la porscienca utiligo de Esperanto. Tiu estus grava servo, donante portempajn organojn por sinesprimo al flankoj de la movado kiuj cetere restus sen ia gazeta servo.

---

## Raportoj el HOLLYWOOD
### de Joseph R. Scherer

Dum miaj prelegvojaĝoj mi konstatis ke la publiko ĉiam ŝatis vidi lumbildojn pri belegaj regionoj de la mondo. Hodiaŭ mi raportas pri filmo en kiuj oni vidas plej glorajn pejzaĝojn. En ambaŭ *mankas am-intrigoj... sed abundas kuraĝaj aventuroj en natura beleco.*

NORDOKCIDENTA PASEJO
(Northwest Passage) 4****

*M. G. M.-Filmo* kun Spencer Tracy, Robert Young ktp. Reĝisoro: King Vidor. Aventuro, romantiko, sovaĝaj bataloj kun malbonaj indianoj, gloraj liberaeraj scenejoj ĉirkaŭ bluegaj lagoj inter senfinaj arbaregoj en la nordaj regionoj de Norda Ameriko... ĉio en natur-koloraj filmoj! Neniam antaŭe mi vidis tian filmojn. Preskaŭ mankas virinoj, sed la viroj estas aventuremaj kiuj devas travivi multajn penigajn kaj danĝerajn tagojn kaj gvidas ilin la plej kuraĝa Spencer Tracy en la rolo de Majoro Rogers.

Ĉiuj admirantoj de nordamerikaj aventur-rakontoj nepre ĝuos tiun ĉi filmon. La rakonto havas historian bazon kaj jen estas denove bona oportuno por lerni ion pri la historio de la amerika kontinento.

*Opinio.* La multaj belegaj, sovaĝaj pejzaĝoj estas tiom imponaj, ke valorus vidi la filmon eĉ sen la homaj geaktoroj. La aventuremaj kuraĝuloj faras la filmon nur pli ekscita kaj des pli vidinda.

# Psalmo de vivo

*(Laŭ pergazetara enketo,*
*la nun plej amata usona poemo.)*
*Verkita de*
*Henry Wadsworth Longfellow,*
*1807-82*

---

Ne asertu tristavorte,
    "Vivo estas sonĝo nur."
Viv' se dorma, dormas morte,
    Blinda je la verkontur'.

Vivo gravas, ĝi solenas.
    Ne la tombo, nia cel'!
"Polvo vi, al polv' revenas,"
    Mutas ĉe l' animnivel'.

Nek ĝuado nek doloro
    Estas nia vivkial',
Sed *agad',* ke ĉiu horo
    Gvidu plu tra l' tempoval'.

Arto longas, Tempo kuras.
    Niaj koroj, fortaj plej,
Kiel en mortmarŝ' tamburas
    Vojon al la mortintej'.

Vi — heroo je konduto
    Estu en la vivbatal'!
Ne similu al dombruto,
    Sklave muta en la stal'!

Fidu ne al Glor' Estonta!
    La Pasint' mortkuŝu for!
Agu, en la Hor' Estanta!
    Helpas Di' al forta kor'.

Noblaj vivoj sugestegas:
    "Nia viv' sublimu!" ĉar,
Forpasante ni restigas,
    Markojn ĉe la tempomar',

Sub pied' ensable prema.
    Eble vidos ŝiprompul'
Morna, kaj pro sent' fratema
    Rekuraĝos la okul'.

Ni ekagu, do, fidelaj,
    Kun sortvenka, brava kor',
Daŭre serĉaj, daŭre celaj,
    Paciencaj en labor'.

(Tradukis *Ernesto Dodge,* en la urbo Washington.)

# LA NUNA KRIZO

*(Ĉefaj strofoj el fama poemo, verkita en decembro,* 1844, *de James Russell Lowell, usona poeto, kiu vivis de* 1818 *ĝis* 1891.)

---

Ĉe agfrapo por Libero, tra l' dolora brust' de l' mond'
Ĝoj' profeta okcidenten vibras en mondcirkla ond'.
Ĉiu sklav' kaŭranta sentas kiel grimpas la anim'
Al terura bord' homstata; la centjara fortesprim'
Plene floras sur dorntigo tempa, je la tempolim'.

En kabanon kaj palacon fulmrapidas agoni'
Kiam naskdolor' Epoka mondsistemojn skuas pli;
Ĉe naskiĝ' de ĉiu Ero, kun ekrekonanta trem'
Gent' al gento timrigardas, muta pro spiritoprem',
Dum sub koro de l' Estonto saltas id' de Vero mem.

Unu, la homar', spirite; kvazaŭ per elektra ond'
Fulmas sento pleninstinkta pri l' justeco ĉirkaŭ mond'.
Ĉu konscie, ĉu nescie, tamen tuta la homar'
Sentas kiel trans la maroj saltas ĝojo aŭ amar': —
Sorto eĉ de unu raso gravas por la mondrasar'.

Unu fojon al persono, aŭ nacio, venas hor' —
Findecidas por la Vero aŭ Malver' ilia kor';
Sankta dev' mesie montras vojon al florad' aŭ mort';
Dividmetas ŝafojn dekstren — damnas kaprojn juĝa vort';
Kaj ĉiamas la elekto inter hela kaj nigra sort'.

Rerigardu ni epokojn, en pasint-lumsigna star' —
(Forgesitaj kontinentoj pintas sur forgesa mar'!)
Venas krizoj — ventumantoj diaj de la homo-gren' —
Sed ne estas en kortego nek vendejo la kompren';
La elekt' ne grava ŝajnas, ĝis la juĝo pasis mem.

Ŝajnas la Venĝant' senzorga; histori' rakontas nur
Pri mortlukto en mallumo inter la Vort' kaj morkontur'.
Ĉiam Ver' sur eŝafodo, ĉiam la Erar' sur tron' —
Tamen tiu eŝafod' l' estonton regas; kaj post ombr'
Staras Dio okulgarde ĉe la Siaj en la mond'.

Mondheroojn primeditu: sen kunul', ilia star'!
La de ili penzorgataj pagis per ŝtonjeta far'!
Tutserene ili vidis, ke kliniĝos la pesil'
Al justeco, pro ilia fido je la Vera bril', —
Eĉ pro *unu* altfidela al supera Di-konsil'.

Ĉar homar' antaŭeniras; kie staras nun martir',
Morgaŭ kaŭras la Judaso kun arĝent' de fiakir';
Jen antaŭe staras preta kruco, kaj mortŝtipa brul', —
Mokkriantoj de hieraŭ en silent', pro ampostul',
Disajn cindrojn nun kolektas por Temp-templa urn-angul'.

Devojn Temp' instruas novajn; krudas nun malnova bon';
Devas supren kaj antaŭen la aŭdant' de Veradmon';
Jen antaŭe teŭarfajroj niaj; ho, pilgrimoj ni!
Surakvigu pilgrimŝipon, gvidu ĝin tra l' marglaci',
Sed Estonton ne mezuru laŭ Estinta sang-raci".

(Tradukis *Arthur Regal,* en la urbo Chicago.)

# ARGENTINA ESPERANTISTO

*OFICIALA ORGANO DE ARGENTINA ESPERANTO — ASOCIO*

Redakcio kaj Administracio: *Misiones,* 369. *Buenos Aires. Argentino.*

Aŭgusto-Septembro. 1940. N-ro 174-175


## KONSISTO DE ARGENTINA LOĜANTARO

Ĝis la duono de la pasinta jarcento la argentina loĝantaro ĉefe konsistis el hispanoj, indianoj, negroj kaj mestizoj en ĉiuj gradoj. La periodo de vera enmigrado komenciĝis nur en la jaro 1852, post la falo de la diktatoro Rosas, ĉar dum la regado de l' tirano fakte okazis elmigrado de argentinanoj.

De tiu dato ĝis komenco de la nuna jarcento 2 158 423 da enmigrintoj envenis. Tiu nombro konsistis el:

| | |
|---|---|
| Italoj | 1.331.536 |
| Hispanoj | 414.973 |
| Francoj | 170.293 |
| Aŭstro-Hungaroj | 37.953 |

kaj la cetero el germanoj, angloj, svisoj kaj en pli malgrandaj kvantoj el aliaj landoj.

Estas rimarkinde la alta kvanto da francoj veninta dum tiu periodo, kaj tiu fakto eble obeas al la politikaj persekutoj kiuj postsekvis la okazintajojn de 1871, ĉar la francoj neniam plu venis en tiel alta proporcio.

En 1914 la loĝantaro de la lando nombris 7 885 000, el kiuj 5 127 000 estis enlandanoj el eŭropa deveno, 400 000 enlandanoj kun indiana sango kaj 2 358 000 estis alilandanoj, ĉefe eŭropanoj.

Dum tiu lasta kvaronjarcento la enlandanoj de eŭropa deveno duobliĝis; ili estas nun 10 230 000. La eksterlandanoj nombras 2 522 000, el kiuj 902 000 italoj, 721 000 hispanoj kaj 899 000 de aliaj nacioj. La konsisto de la loĝantaro en januaro de 1939 estis jena: loĝantoj 12 958 217, el ili viroj 53,3%, virinoj 46,7%. Urba loĝantaro 74% kaj kampara 26%. Tiu amaŝiĝo de homoj en urboj estas sufiĉe stranga en agrikultura lando. Ĝi pli akcentiĝis dum la lastaj 25 jaroj.

La itala revuo "La Difesa Della Razza" kalkulas ke de la jaro 1857 envenis en la landon 3 000 000 da italoj, kaj ke kune kun ilia posteularo ili nombras 5 100 000. Sed oni devas memori ke la fraŭle envenintaj italoj ni tro atentas pri la nacieco de iliaj elektotaj edzinoj — eĉ japanojn mi vidis kun argentinaj edzinoj! Kaj notinde estas ke germanoj kaj ĝermanoj blonduloj, sentas rimarkeblan inklinon al edziĝo kun brunhaŭtaj kreolinoj. Cetere tiu fakto estas bone konata en ĉiuj landoj, kie tiu du homaj elementoj renkontiĝas.

De 1911 al 1937 la enmigrada fluo senteble reduktiĝis. Ekde 1933 la argentina registaro, kiel cetere ĉie en la mondo, limigis la enirpermesojn kaj de 1938 tiuj limigoj ankoraŭ pliakcentiĝis.

———

Sed kiu estas la rezultoj de tiu miksado? La rezulto estas la Argentina Respubliko en ĝia nuna stato. Antaŭe ekzistis nur la kolonio, ĉar la "patroj de la patrolando" havis nenion komunan kun la kolonia spirito.

Kompreneble la hispana lingvo iom suferis por tiu alfluo. En la landoj de la pacifika bordo, kie la enmigrado ne estis tiom granda, la lingvo de la mezkleraj personoj konserviĝis certe pli pura ol en Buenos Aires, sed tamen la skriba lingvo estas ĉie la sama. Malgraŭ tiu babela influo oni povas tamen aserti ke la hispana lingvo estas pli unueca en la Argentino ol en Hispanio mem.

Evidente italoj kaj hispanoj estas la plejnombraj en la enmigrinta loĝantaro, sed ial ilia influo en la kulturo ne respondecas al ilia nombro. Fakte ili tute ne sukcesis forpuŝi la francan kulturon, kiu enradikiĝis frue en la landon kune kun la modernaj ideoj ĉe kiuj trovis inspiron la revoluciaj elitoj, kiujn ni jam menciis.

Poste venis la influo de la angla kapitalo kaj poste tiu de la usona. Kaj miloj da gejunuloj eklernis la anglan lingvon. Estas tamen strange ke tiu fakto ankaŭ ne sukcesis forpuŝi la influon de la franca kulturo, ĉar okazas tiu kurioza fenomeno: dum la lernantoj de la angla lingvo estas plurfoje pli nombraj ol tiuj de la franca lingvo, la francaj libroj estas vendataj en multe pli granda kvanto ol la angla. Kaj simile okazas en aliaj kampoj de la kulturo.

———

Kaj la praloĝantoj de la lando? La indianoj nombras nuntempe 170 000. En tiu nombro kompreneble ne estas enkalkultitaj tiuj, kiuj asimiliĝis al la civilizita vivo, sed nur tiuj, kiuj vivaĉas en pli malpli primitiva stato, aŭ en kampoj asignitaj de la registaro.

Tiuj indianaj popoloj, kiuj posedis pli altan nivelon de kulturo, kiam la hispanoj venis en la landon, baldaŭ alprenis la kutimojn de la konkerantoj. Tiel okazis kun la gŭaranioj ĉe la nordoriento kaj la popoloj de nordokcidento kiuj iam ricevis la influon de la inkaa kulturo. Ankoraŭ ili konsideras kaj uzas, krom la hispana, siajn respektivajn pralingvojn: la gŭarania kaj la kiĉŭa.

La mongoloj, tibetanoj k. a. fieras pro la pureco de iliaj rasoj. La amerikanoj fieras pro tio, ke ĉi tie estas la "Krisolo de la rasoj". Ĉu mortbatali pro tio?

GEORGO.

## SARMIENTO

Kiu vizitas la argentinan urbon San Juan, tiu trovos ke tie kaj tie kelkaj stratoj havas malsaman larĝon. Se oni demandas pri la kialo de tiu afero oni scios, ke tiun plilarĝigon de stratoj entreprenis Sarmiento, kiam li estris la provincon... kaj Sarmiento naskiĝis en 1811 kaj mortis en 1888. Ne nur la stratojn li volis plilarĝigi, sed plilarĝigi li volis la vojon de l' progreso. Eble tial oni nomis lin "el loco Sarmiento" (la freneza Sarmiento). Kaj pro tio ankaŭ per eksterordinara klarvido li studis la tiaman socion en Ameriko kaj precipe en Argentino. El tio rezultis libroj, kiujn li jetis kiel sagojn al liaj malamikoj, sed kiuj ankoraŭ meritas legadon kiel valoraj dokumentoj, kiuj estas belstile verkitaj.

Deveninta el malriĉa familo, en malproksima provinca urbo, kie nur unugrada lernejo ekzistis, Sarmiento estas alta ekzemplo de memlernanto. En 1826 jam li lernis la latinan lingvon dum li vendis fazeolojn en iu butiko. En 1829 li lernas la francan lingvon helpe de soldato de Napoleono, kiu ne konis francan gramatikon. Poste li lernas la anglan. Li legas ĉion, kio trafas en siajn manojn, sed ĉefe impresis lin "La vivo de Franklin", legita en 1826. Fakte li ĉiam restis fervora admiranto de la norda-

merika progreso, kiun li montris al sudamerikanoj kiel ekzemplo.

Fera kaj senlaca batalanto li estis, ekzilita kaj enkarcerigita plurfoje, kiam li batalis en la vicoj de la popolo, kaj malhelpata, ĉefe el sub la ombro kiam li estis en la registaro. Sed neniam li cedis antaŭ la malamikoj de l' progreso. Liaj konkretaj faroj rilatas al pasinta epoko, sed lia spirito, la celo de liaj klopodoj apartenas ankoraŭ al la estonto.

---

El la paĝoj dediĉitaj al la kampara vivo ni tradukis ĉi tiun priskribon pri unu el la plej interesaj tipoj, kiun la kuniĝo de hispanoj, indianoj kaj la senlima dezerta naturo produktis en Ameriko.

*LA SPURSEKVISTO* (1)

La plej elstara el ĉiuj, la plej eksterordinara estas la spursekvisto (rastreador). Ĉiuj gaŭĉoj de la internaj regionoj estas spursekvistoj. En tiom ampleksaj ebenaĵoj, kie la vojoj kaj ireoj kruciĝas en ĉiuj direktoj, kaj la kampoj, kie la bestoj paŝtas aŭ trairas estas malfermitaj, estas necese ke oni kapablu postsekvi la spurojn de ĉiu besto kaj distingi ilin el milo da aliaj; ekkoni ĉu ili iras rapide aŭ malrapide, libera aŭ ligita, ŝarĝita aŭ senŝarĝa. Tiu ĉi estas hejma kaj popola scienco.

Iutage mi venis laŭ flanka vojo al tiu de Buenos Aires, kaj la gaŭĉo, kiu akompanis min, ĵetis kiel kutime sian rigardon al la tero. "Ĉi tie pasis, li diris post momento, tre bona malhela muleto... tiu ĉi estas la mularo de Don Zapata... ĝi estas tre bona por rajdo... ĝi iras selita... hieraŭ ĝi pasis". Tiu ĉi homo venis de la montaro de San Luis, la mularo (2) revenis de Buenos Aires, kaj forpasis unu jaro de kiam li la lastan fojon vidis la malhelan muleton, kies spuro estis intermiksita kun tiuj de la tuta grego en vojeto du futojn larĝa. Sed tio, kio ŝajnas nekredebla estas nur vulgara scienco; tiu ĉi estis simpla gregkondukisto kaj ne profesia spursekvisto.

La spursekvisto estas grava persono, singardema, kies asertoj validas ĉe la malsuperaj tribunaloj. La konscio pri la scio, kiun li posedas donas al li ian misteran kaj sindetenan indecon. Ĉiuj traktas lin kun respekto; la malriĉulo, ĉar li povas malutili lin per denunco aŭ kalumnio; la bienposedanto, ĉar lia atesto povas manki en la bezonata momento.

Ion oni ŝtelis dum la nokto; tuj kiam oni tion rimarkas oni rapidas por serĉi spuron de la ŝtelisto; trovinte ĝin oni ĝin kovras por ke la vento ne forblovu ĝin. Oni tuj vokas la spursekviston, kiu rigardas la spuron kaj ĝin sekvas rigardante nur de tempo al tempo la teron, kvazaŭ liaj okuloj vidus reliefigita tiun spuron, kiu por aliaj estas nerimarkebla. Li laŭiras stratojn, trairas ĝardenojn, eniras en iun domon kaj montrante viron, kiun li renkontas senpasie diras: "Estas li". La delikto estas pruvita kaj malofte la krimulo kontraŭdiras tiun ĉi akuzon.

Mi mem konis Calibar'on (Kalibar), kiu senpaŭze plenumis en iu provinco sian metion dum 40 jaroj. Li nun estas preskaŭ 80 jara; kurbiĝinta pro la aĝo, li tamen konservas respektindan aspekton, plena je indeco.

Oni rakontas ke dum li forvojaĝis al Buenos Aires, oni ŝtelis ĉe li lian festotagan selon. Lia edzino kovris la spuron per knedujo. Post du monatoj, Calibar revenis, li rigardis la spuron jam malaperintan kaj neperceptebIan por aliaj okuloj, kaj oni ne plu parolis pri la afero. Unu jaron kaj duonon poste Calibar marŝis kun mallevita kapo tra iu strato ĉirkaŭurba, eniras domon kaj tie li trovas sian selon, jam nigriĝinta kaj difektita pro la uzado. Li estis trovinta la spuron de ĝia ŝtelinto preskaŭ du jarojn poste!

En la jaro 1830 iu mortkondamnito fuĝis el malliberejo. La malfeliĉulo antaŭvidante ke oni serĉos liajn spurojn prenis ĉiujn antaŭzorgojn, kiujn la bildo de la eŝafodo inspiris al li. Senutilaj antaŭzorgoj! Eble ili nur pereigis lin, ĉar trovante komprometita sian reputacion, la ofendita sinestimo de Calibar instigis lin arde plenumi tiun taskon, kiu pereigis homon, sed kiu elpruvis lian mirigan vidkapablon. La forkurinto profitis ĉiun malglataĵon de la tereno por ne postlasi spurojn; centojn da paŝoj li faris per la piedpintoj. Li surgrimpis la malaltajn murojn, krucis iun lokon kaj revenis. Calibar lin sekvis ne perdante la spurojn. Se momente li eraris, retrovinte ilin denove li ekkriis "Kien li forkuru". Fine li venis al kanaleto ĉe la ĉirkaŭurbo, kies fluon la fuĝinto sekvis por trompi la serĉonton. Senutile! Calibar marŝis laŭ la bordo, trankvile, senhezite. Fine li haltas, esploras kelkajn herbojn kaj diras: "Ĉe tiu ĉi loko li eliris; ne estas spuroj, sed tiuj ĉi akvogutoj tion montras". Li iris en vinberplantejon. Calibar esploris la ĉirkaŭantajn murojn kaj diris "Li estas interne". Post longa traserĉo la patrolo revenis por informi pri la senutila esploro. "Li ne eliris", estis la mallonga respondo, kiun ne movante sin, ne farante novajn esplorojn donis la spursekvisto. Kaj la sekvantan tagon li estis ekzekutita.

En 1831 kelkaj politikaj malliberuloj organizis fuĝon. Ĉio estis preta, la eksteraj helpantoj jam estis avertitaj. En la momento ĝin efektivigi iu diris; "Kaj Calibar?" "Vere", respondis la aliaj, terurigitaj. Calibar!" Iliaj familianoj sukcesis ĉe Calibar ke li estu malsana dum kvar tagoj, kalkulante ekde la fuĝo, kaj tiamaniere la afero okazis sen malhelpoj.

Kiu mistero estas tiu de la spursekvisto? Kia majesta kreitaĵo estas tiu, kiun Dio faris laŭ sia bildo kaj similo!

---

(1) Spuro — postsigno.

(2 Por surdorsa transporto de varoj.

---

## Elektroteknika Internacia Vortaro en hispana lingvo

(Vocabulario Electrotécnico Internacional por la Comisión Electrotécnica Internacional. Versión castellana del Comité Electrotécnico Argentino. Buenos Aires. 1939).

Aperis, fine de 1939, la hispana traduko de la Internacia Elektroteknika Vortaro. La difinoj de la terminoj en la hispana lingvo estas sekvataj de iliaj tradukoj en la lingvoj franca, angla, germana, itala kaj Esperanto. Ĉe la fino de la libro, dekkvarpaĝa indekso por ĉiu lingvo permesas uzi tiun verkon kiel multlingvan vortaron.

La enkonduko de Esperanto en tiun gravan verkon kies ellaborado daŭris 32 jarojn, estas sekvo de la neceso de la sciencaj kaj teknikaj rondoj internaciaj por unu lingvo scienca internacia kaj la klopodoj de esperantistaj sciencistoj konvinki aliajn pri la taŭgeco kaj uzebleco de nia lingvo por tiu celo. Ne ĉiuj teknikistoj estas jam konvinkitaj pri la neceso de Esperanto kaj multaj eĉ estas kontraŭuloj. Laŭ la decido de internaciaj kongresoj oni permesis provizoran enkondukon de nia lingvo, kiel provon, por poste decidi pri la fina sinteno.

La fina sinteno de la internaciaj kongresoj de teknikistoj kaj sciencistoj dependas, finfine, de la sinteno de la esperantistaj teknikistoj. Se ni uzos la jam atingitajn rezultojn kaj utiligos la esperantistan terminaron de la internacia vortaro, donante al ĝi vivon pere de internacia kunlaborado de diverslingvaj fakuloj, tiam la fina venko

estos nia. Kaj tiel estu! Ni sekvu la laboradon de la esperantistaj scienculoj kaj modeste ni aldonu nian parton al ĉies verko: uzado de la internacia helpa lingvo Esperanto por la bono de la tuta Homaro.

L. M.

---

Bonvolu mendi ekzempleron, kies kosto estas: 9 pesoj argentinaj rekte al la "Comité Electrotécnico Argentino, Paseo Colón 185, Buenos Aires, aŭ al "Argentina Esperanto-Asocio", Missiones 369. Buenos Aires, Argentina.

---

## *IMPRESOJ DE ĴUS VENINTA EŬROPANO*

Dek tagojn post mia elŝipiĝo en la haveno de Buenos Aires, antaŭ preskaŭ unu jaro, ĉiuj gazetoj aperigis per grandegaj literoj skribitajn titolojn: "Milito!" "Tiun tagon eksplodis la nuna eŭropa milito, kiu jam disvastiĝis sur partoj de la du aliaj malnovaj kontinentoj.

En la mallonga periodo de unu jaro malaperis tuta aro da liberaj kaj florantaj ŝtatoj. Aliaj subjugiĝis kaj fariĝis vasaloj. De post tiam, eĉ ne unu tagon forestis el la gazetaj sciigoj pri la terurajoj kiuj tie okazas, kaj se alvenas letero, ĝi estas per sango kaj larmoj skribita.

Kiam mi lastfoje travojaĝis Eŭropon, de Zagreb, en Jugoslavio, ĝis Bulonjo sur Maro, ankoraŭ ĉio estis trankvile, sed en la aero jam minace ŝvebis la pulvodoro. Kaj ĉiu minaco efektiviĝis. Ne malaperis nur ŝtatoj, oni ne mortigaĉas nur centmilojn da senkulpaj estaĵoj; en granda parto de Eŭropo oni mortigas en multaj milionoj da homoj la fidon je homeco, la kredon je plej eta justeco. Fine malaperis tie eĉ la postsignoj de libera pensado kaj agado.

Kiam mi alvenis en Argentinon, mi travojaĝis ĝian grandan parton, kaj surprizis min la tero, ĝiaj loĝantoj kaj la regantaj principoj, kiuj estas tute kontraŭaj al tiuj, kiujn mi vidis en Eŭropo. Dum la pene kulturitaj eŭropaj kampoj estas forlasitaj pro la milito, aŭ detruitaj de malamikaj bomboj kaj botoj, la argentina fruktodona kamparo dezire atendas ĉiun laboreman manon, kaj donas siajn fruktojn al ĉiu, kiu volas ĝin rikolti. La amo al la lando de tiu ĉi pacema popolo impresas kiel forto, kiu certigas ĝian trankvilan estonton. La ŝtaton regas principoj de libereco. Ĝi gastigas kaj gastigos ankoraŭ multajn, kiuj restis sen siaj domoj kaj sen libereco en aliaj kontinentoj; ĝi donas al ili eblecon uzi siajn fortojn en trankvila laboro.

Do, en tiu ĉi lando la cirkonstancoj estas treege favoraj por la kultura evoluo, kiu perdas terenon en la malnovaj kontinentoj, Kaj se la centro de la kulturo translokiĝus en tiun ĉi kontinenton, ne okazus tiu la unuan fojon, ĉar ĝi vere brilas la suno, kiun adoris du grandaj popoloj de preskaŭ forgesita, sed admirinda civilizo: la Inkaoj kaj la Majoj.

La esperanto-movado estas parto de la nuna kultura evoluo, kaj ĝia ekzisto en Eŭropo estas treege endanĝeririta. Tiu fakto devigas nin preni sur niajn ŝultrojn novajn taskojn. La amerika esperantistaro ne plu povas kontentiĝi per la vivtenado de la movado, sed ĝi devas sur la ekzistanta bazo konstrui fortan kaj unuecan movadon. Kaj, laŭ la impresoj, kiujn mi ricevis ĉi tie, mi fidas ke la Amerikanoj plenumos sian taskon.

*T. Sekelj.*

---

# NIA MOVADO EN ARGENTINO

La esperantista vivo en Argentino, same kiel en la ceteraj hispanamerikaj landoj, estas malsimila al tiu de Eŭropo. En la duono de la amerika kontinento oni parolas la hispanan lingvon aŭ la parencan portugalan lingvon, La argentinanoj tial ne sentas tian intereson por la problemo de lingvo internacia, kial la eŭropanoj, kiuj dum unutaga vojaĝo traveturas multajn landojn kun diverslingva loĝantaro. La eŭropaj enmigrintoj deziras unue lerni la hispanan lingvon por povi tiel kompreni sin. Tial la esperantista movado ne estas tiom disvastigita kaj forta, kiom en Eŭropo.

La Argentina Esperanto Asocio estas la ĉefa kaj la plej grava esperantista organizaĵo en la Argentina Respubliko, sed ĝi ne estas la landa organizo, kiu unuigus ĉiujn esperantistajn grupojn kaj izolajn esperantistojn en la lando. Ĝi estas la spirita ligilo de la argentinaj, kaj ankaŭ de multaj alilandaj hispanamerikaj esperantistoj, sed ĝi ne unuigas ĉiujn organize. La plej aktivaj membroj de ĉiuj lokaj grupoj estas ankaŭ anoj de A. E. A., sed la grupoj, kiel tiaj, ne formas parton de ĝi. Tiu fakto, kaj la grandeco de la lando kaj la maldenseco de la loĝantaro malhelpas la rapidan progreson de la movado. La tempa ĉeso de la esperantista movado en Hispanujo influas ankaŭ malfavore nian movadon. El Hispanujo venis lernolibroj, revuoj, propagandaj broŝuroj kaj amika helpo.

Malgraŭ ĉio la movado lastjare montris certajn progresojn. En Buenos Aires estas gvidataj du kursoj por komencantoj, unu el ili laŭ la Cseh-metodo de rajtigita instruisto, samideano T. Feyö. La gramatikan kurson gvidas s-no A. Barrot en la hispana organizaĵo PEAVA. En Rosario la "Asociación Esperantista de Rosario" gvidas kursojn en la lernejo "Rosalía de Castro". En Mendoza la diligenta s-no T. Ductil gvidas ankaŭ kurson.

Gravan laboron por la instruado de Esperanto faras la koresponda kurso, kies lernantoj estas dissemitaj en la tuta Argentino kaj en la aliaj hispanamerikaj landoj.

Danke al klopodoj ĉe la radio stacio LS8 Radio Stentor de Buenos Aires ni povis propagandi niajn ideojn ĉe la disaŭdigo de "Platea Club". Paroladis unue la prezidanto de AEA, s-no G. Bruno López, poste s-noj E. Luraschi, T. Sekelj kaj nun paroladas regule ĉiuvendrede D-ro J. A. Quiña Gonzalez. La rosarianoj sukcesis same ĉe la L. T. 1. Radio del Litoral de Rosario.

S-no J. A. Quiña González gvidas regulajn ĉiusemajnajn rubrikojn en la jurnaloj "El Pueblo" kaj "Diario Sirio-Libanés". La gazetaro publikigas pli volonte sciigojn de la informa servo, kiuj estas sendataj ankaŭ eksterlanden.

En Buenos Aires oni notas uzadon de nia lingvo, danke al la Viva Gazeto kaj pro la aliĝo de fremdlandaj esperantistoj, kiuj parolas pli flue Esperanton ol la hispanan lingvon.

Gravega helpo por la argentinaj kaj ceteraj hispanlingvaj esperantistoj estas la lernolibroj verkitaj de D-ro J. Scolnik kaj I. Gomes Braga kaj eldonitaj en Brazilo. Tiuj libroj permesas diskonigi nian lingvon inter la vasta amaso de libroaĉetantoj, kiuj ne povas sekvi parolan aŭ skriban kurson.

La argentina esperantistaro fidas esperplene al la estonteco de niaj idealoj en sia lando kaj en la tuta Ameriko!

*Lázaro Musih.*

# KANADA BULTENO

Dumonata bulteno de "KANADA ESPERANTISTA ASOCIO"
Sidejo G. P. O. Box 272. TORONTO. CANADA.
Vol. 2 N.º 5 Oktobro 1940

## INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate. Rickmansworth (Herts.), *Anglujo.*

KOMITATANO

D-ro Carlos Domingues. Rua Alvaro Alvim, 27. Rio-de-Janeiro, *Brazilo*

PERANTOJ

*Argentino* — Giordano Bruno Lopez . El Rastreador 360, Buenos Aires.
*Brazilo* — Brazila Ligo Esperantista. Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro.
*Kanado* — Kanada Esperantista Asocio. G.O.P. Box 272, Toronto (Ont.).

ĈEFDELEGITOJ

*Brazilo* — A. Antunes Pinheiro, Rua Dr. Pereira Nunes, 116. Niteroi. E. do Rio.
*Urugvajo* — Pedro Casas, Str. San José, 1123. Montevideo.
*Usono* — Donald E. Parrish, 328 W. 46th Los Angeles (California).

DELEGITOJ

*Ekvatoro* — J. Standler, komercisto, Casilla 854. Quito.
*Gujano Franca* — R. Martin, ŝtatoficisto, Territoire Tuine, par Cayenne.
*Kolombio* — D-ro A. de J. Rico, kuracisto. Sogamoso (Boyacá).
*Kubo* — H. Cocina, Manzana de Gomez 240. Habana.

VICDELEGITO

*Meksikio* — G. Castro Guadarrama, kompostisto, Nino Perdido 74-32. Meksiko.

En la sekvantaj landoj ekzistas:

*Argentino*: 17 delegitoj, 3 vicdelegitoj kaj 2 fakdelegitoj.
*Brazilo*: 22 delegitoj, 4 vicdelegitoj kaj 34 fakdelegitoj.
*Kanado*: 5 delegitoj.
*Usono*: 58 delegitoj, 7 vicdelegitoj kaj 11 fakdelegitoj.

KANADO

Delegitoj

ESQUIMALT (British Columbia)
R. Redhead, civila dungito, 731 Wilson Street, Victoria.
HAMILTON (Ontario).
E. J. Bengough, universitata registristo, 54 Whitton Road.
MONTREAL (Quebec).
P. L. Ptatley, civila inĝeniero, 5 Tournhill Avenue Westmount.
Ste. ANNE de BELLEVUE. (Quebec).
J. V. Lawson, studento, 1 Kent Avenue.
TORONTO (Ontario).
H. S. Boyd, oficisto, 315 Melrose Avenue.

## GARDU VIAJN REVOJN!

Gardu viajn revojn,
Kvankam paŝoj estas
Lacaj sur la voj',
Kun rideto iru
Dum via malĝoj'.

Gardu viajn revojn,
Kiam venas zorgoj,
Ĝis la nokta fin',
Ĉar post la mallumo
Tag' salutos vin.

Gardu viajn revojn,
Kiam eĉ kuraĝo
Mankas kaj esper'
Sub ĉielo nigra
Kaj malĝoja ter'.

Gardu viajn revojn,
Eble per revado
Renaskiĝos ĝoj',
Kaj tra la nebulo
Brilos luma voj'.

*J. H. Hartley,*
Hamilton, Canada.

*ELĈERPITAĴO*

Laŭ kelkaj sciencistoj, la homa haŭto diferencas nur en ĝia grado. Simile, homaj naztruoj diferencas laŭ klimatoj. Nigro, loĝante en la sudo, alklimatiĝis spiri varman aeron per larĝaj naztruoj. Eskimo, loĝante en la norda regiono, estas helpata de la naturo per la ricevo le mallarĝaj naztruoj, ĉar pulmoj ne toleras enprenadon de tro multe da malvarma aero ĉiam, kiam oni enspiras.

*Elsa Vento.*

## ENIGMO

A K A R O
D O G A N
I R A D O
D R A P O
A N I N O

Jen estas malgranda enigmo. Kun la literoj de ĉiu vorto aranĝu novan vorton sur la sama linio tiel, kiel oni ankaŭ legos kvin vortojn vertikale.

La solvo estas sur paĝo 12a.

## La Zamenhofa Familio

Ĉiu leganto estos tre kontenta scii, ke finfine ni ricevis ŝajne tute fidindan informon pri la Zamenhofa familio. D-ro Adam Zamenhof ne mortis, kiel antaŭe estas raportite, sed estas en malliberejo en Varsovio. Lia edzino, lia filo, kaj liaj fratinoj Lidja kaj Sofja estas liberaj kaj loĝas en Varsovio.

Ni nun havas iliajn adresojn, kaj tio multe helpas nian agadon. Ni klopodas aranĝi, ke ili komencu novan vivon aliloke, sed la negocoj certe daŭros ankoraŭ iom da tempo. Ni jam petis donacojn por helpi al la familio de nia majstro kaj certe, se la nunaj klopodoj sukcesus, ni bezonus sufiĉe grandan sumon por pagi la veturajn kaj aliajn elspezojn, kaj por vivteni la familion, ĝis ili povus mem fari tion. Se la mono ne estus bezonata, ni redonus ĝin al la donacintoj.

*Cecil C. Goldsmith.*
*Ĝenerala sek. de I. E. L.*
(El "*Amerika Esperantisto*")

## I. E. L.

KIO ESTAS I.E.L.?

I.E.L. (Internacia Esperanto-Ligo) estas asocio de Esperantistoj kun membroj en preskaŭ ĉiu lando en la mondo. Ĝi posedas propran domon proksime de Londono, kiu funkcias kiel la Centra Oficejo.

Ĉiu konscia Esperantisto celanta disvastiĝon de nia ideo devus, en sia intereso kaj tiu de la movado, aliĝi al la tutmonda Esperantista asocio.

INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO,
*Heronsgate Rickmansworth* (*Herts.*),
*Anglujo.*

LA JARLIBRO estas la ĉefa eldonajo de I.E.L. Ĉiu individua membro ricevas tiun tre utilan libron, kiu aperas en ĉiu Marto kun detala informo pri: Esperantistaj grupoj kaj Delegitoj tra la mondo; Esperantistaj organizajoj kaj gazetoj; lernejoj kie oni instruas Esperanton; la nuna stato de Esperanto en la diversaj landoj; kaj multaj aliaj aferoj, kiujn ĉiu Esperantisto bezonas scii.

# RECENZO

("LETEROJ DE E. LANTI", kun antaŭparolo de Profesoro G. Waringhien. 272 pĝ. Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda. Parizo. 1940.)

En alia epoko oni bezonis grandan dozon da kuraĝo por aserti ke la tero turniĝas. En niaj tagoj eĉ la plej konservativa tradiciulo povas tion eldiri sen ia ajn danĝero, nek konsciencriproĉo. Tamen la eblo herezumi ne elĉerpiĝis en nia mondo. Kaj tion cetere montras la respektinda nombro da malamikoj, el plej diversaj skoloj, kiujn E. Lanti dum sia esperantista vivo starigis antaŭ si. Sed ankaŭ la nombro de liaj amikoj kreskis kaj ili troviĝas dissemitaj ĉie tra la vasta mondo, kiel cetere decas al mondcivitano esperantisto. Kaj Lanti emas babiladi perletere kun ili. Se ni scias ke nia herezulo jam de pli ol kvin jaroj vagadas tra la mondo, vizitante la plej diversajn landojn kaj iam legis lian klaran kaj elegantan prozon, ankaŭ konsentos ke kompilado kaj eldonado de liaj leteroj povas esti interesaj al pli granda nombro da esperantistoj. El tio rezultis ĉi tiu kolekto de 60 leteroj pri la plej diversaj temoj: marksismo, bolŝevismo, moralo, budaismo, judismo, pri liaj travivaĵoj en Japanio, pri japanaj virinoj. Troviĝas tie ankaŭ longa kaj interesa letero al la franca poeto-filozofo Han-Riner, varbita al Esperanto de Lanti mem, letero pri Rabelezo (Rabelais) — iel lia spirita parenco — ĉe kiu Lanti malkovras eldirojn favorajn al la mondlingva afero. Ĉarma estas letero kvazaŭ verkita de la personigita animo de la arbaro de Fontenblo, kaj la kolekton finas tri longaj leteroj pri sennaciismo.

Interese estas ankaŭ ke tiuj leteroj estis senditaj de la plej diversaj anguloj de l' planedo: Parizo, Narvik, Lisbono, Sidnejo, Tokio, Hong-Kong k. a.

Sed oni vane serĉos en la libro "vojaĝpriskribojn". Lanti, kiel Diogeno, nur serĉas la homon, la homon kaj liajn problemojn, lian sensukcesan baraktadon por akordigi mezepokan sociarangon kun la nuntempa teknika evoluiĝinta mondo... kun la konata rezulto... Sed ĉie la leganto trovos pensinstigon kaj ĝuon en la klarstila verkaĵo.

"Se mi ŝuldas al Grosjean-Maupin la nocion pri la logikeco kaj korekteco de la lingvo - diras profesoro G. Waringhien en sia antaŭparolo al "Leteroj" — al Lanti mi ŝuldas la senton pri ties vivanteco".

*H. HESS. (El Argentino).*

USONANOJ KIUJ ANONCAS DEZIRON KORESPONDI

La subaj membroj aŭ grupoj en Usono anoncas sian deziron havi amikan korespondon kun Esperantistoj en ceteraj landoj de la Nova Mondo. "Per korespondado kreskas la valoro de la lingvo al la korespondantoj, kreskas la valoro de la korespondantoj al la movado". Notu zorge ke *ĉiu adreso en Usono* devas montri, krom la urbonomo, la nomon de *la Ŝtato* — plejofte en formo de mallogiĝo.

Cseh-metodaj gelernintoj ĉiuaĝaj, de f-ino Roan U. Orloff, deziras korespondi kun ĉiu persono pri ĉiu temo. Skribu al: Esperanto-Rondo Amika, Trinity Court, 175 Dartmouth St., Boston, Mass. U.S.A.

Grupo de bahaaj geesperantistoj deziras korespondi kun religiemaj gesamideanoj. Skribu al: f-ino Roan U. Orloff, Hotel Gralyn, 20 Charlesgate West Boston, Mass., U. S. A.

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo, pri iu ajn temo. S-ro C.N. Ayers, 9 Hazel St., Saugus, Mass., U.S.A. (P.O. Box, 1.104).

F-ino Ann Ziener (adreso: 2022 Valentine Ave., Bronx, N.Y., U.S.A.), deziras korespondi pri turismo kaj personaj interesoj.

S-ro R. Kelly deziras korespondi pri seriozaj temoj; hispana muziko. Adresu: 214 E. 17th St., New York, N.Y. (U.S.A.)

Kursanoj en la usona ĉefurbo deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Skribu al: S-ro Thomas Goldman, 720, 21st St., N.W., Washington, D.C., (U.S.A.)

S-ro Byron Buck (Garfield Hotel, Cleveland, Ohio, U.S.A.) deziras korespondi pri vojaĝo, kaj personaj temoj.

F-ino Betty Gruschka (5881 Dunham Rd., Maple Heights, Ohio, U.S.A.) deziras korespondi pri vialandaj kutimoj, muziko, literaturo, sportoj, k.t.p.

F-ino Shirley Schwartz (2772 Lancashire Rd., Cleveland Heights, Ohio) estas 19-jara fraŭlino kaj deziras korespondi pri diversaj temoj.

S-ro Johano M. Tomishin (3034 Nursery Ave., Cleveland, Ohio, U.S.A.) deziras korespondi kun sudamerikano pri sportaviado, vojaĝo., k.t.p.

En granda urbo, "Detroit, Mich., U.S.A." du knaboj 14-jaraj anoncas sin kiel korespondantojn kun ĉiuj landoj, pri skoltaj, ilustritaj P.K. Unu estas Edward Richards, 2636 Huron St., en la supre menciita urbo. La dua estas Stanley Cochrane, kies stratadreso estas 2050 West Alexandrine, Detroit, Mich., U.S.A.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri Esperantaj aferoj kaj turismaj aferoj S-ro Edwin Sievers, 2016 West Alexandrine, Detroit, Mich., U.S.A.

S-ino Grace Stinson, 66-jara vidvino, deziras korespondi pri personaj interesoj: 1211 No. Hudson, Oklahoma City, Okla., U.S.A.

S-ino Jewell Bainbridge, mezaĝa vidvino, per ilustritaj poŝtkartoj. Adresu: ĉe Browning Hotel, Oklahoma City, Okla., U.S.A.

F-ino Bernice X. Rayburn estas de kelkaj jaroj instruistino en publika lernejo; deziras korespondi pri ĝenerala informo kaj diversaj interesoj; 28 East Park, Oklahoma City, Oklahoma, U.S.A.

Junulino deziras korespondi per bildkartoj. Bonvolu adresi al F-ino Clara Harrison, 1528 Northwest 8th St., Oklahoma City, Okla, U.S.A.

F-ino Patricia Webster (3122 Northwest 23rd St., Oklahoma City, Okla, U.S.A.) estas junulino kiu volonte korespondos pri temoj de ĝenerala intereso.

S-ro S. N. Bunch, advokato de pluraj jaroj, deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Lia adreso: First National Bank Bldg., Oklahoma City, Okla. U.S.A.

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun aliaj landoj. S-ro Frank A. Guth, 2333 North 59th St., Seatle, Wash., U.S.A.

ARGENTINA POŜTO




*Memorigante la centjaran datrevenon de la fondo de la "Tutamerika Unuiĝo" la Argentina Registaro ordonis la eldonon de du milionoj de speciala poŝtmarko kun valoro responda al simpla letero al Ameriko kaj Hispanujo. — Ĝi prezentas la amerikan kontinenton en laŭroĉirkaŭita ovalo.*




*Bloko kun 10 pecoj de la poŝtmarko memoriga de la Internacia Filatelia Ekspozicio "BRAPEX", okazinta en Rio-de-Janeiro en 1938*

*Prezo: Unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj. Mendu ĝin al: Brazila Ligo Esperantista. Praça da República, 54 Rio-de-Janeiro. — Brasil —*

## RADIO KAJ ESPERANTO

Ekde la 5a de Aŭgusto lasta la ĉiutaga disradiado en Esperanto, organizata de SÃO PAŬLO ESPERANTA KLUBO, pere de la stacio de "Rádio Piratininga", okazas matene, de la 8.45 ĝis la 9a horo.

De la 25a de Marto nunjara ĝis la 15a de Aŭgusto tiu stacio disradiis 116 horkvaronajn programojn, kiuj daŭris 1740 minutojn aŭ 29 horojn!

# BRAZILA LIGO ESPERANTISTA (B. L. E.)

*Societo de publika utileco, laŭ registara decreto n-ro 4.356, de la 26a de Oktobro de 1921.*

UNUECO DONAS FORTECON

## Statuto

Par. 1a — *Brazila Ligo Esperantista* (B.L.E.), fondita la 21an de Julio de 1907a, kun sidejo en urbo *Rio-de-Janeiro*, celas:

*a*) direkti la ĝeneralan propagandon de Esperanto en Brazilo;
*b*) propagandi Brazilon en la fremdaj landoj pere de Esperanto;
*c*) kunigi kaj helpi ĉiujn Esperanto-grupojn;
*d*) organizi regularojn por ekzamenoj de Esperanto kaj doni la koncernajn diplomojn;
*e*) starigi kursojn superajn kaj per korespondado;
*f*) reprezenti la opinion de la brazilaj esperantistoj al ĝi aliĝintaj;
*g*) estri la organizadon de brazilaj kongresoj de Esperanto;
*h*) eldoni la buitenon "O Brasil Esperantista".

Par. 2a — Brazila Ligo Esperantista en la limoj permesataj de la brazila leĝaro, estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj demandoj.

Par. 3a — Brazila Ligo Esperantista konsistas el:

*a*) izolaj membroj;
*b*) grupaj membroj;
*c*) bonfarintaj membroj;
*d*) honoraj membroj;
*e*) kunlaborantaj membroj;
*f*) filiitaj grupoj (societoj, asocioj, kluboj, ktp).

§ 1a — Estas konsiderataj fondintaj ĉiuj membroj, kiuj estis kvitaj al B.L.E. la 13an de Decembro 1913a.

§ 2a — Estas izolaj membroj ĉiuj, kiuj pagas jaran kotizon, ĉiujare fiksitan de la estraro de B.L.E., plus kotizon pagotan al la internacia organizaĵo, al kiu estas filiita B.L.E.

§ 3a — Estas grupaj membroj ĉiuj anoj de grupoj filiitaj al B.L.E., kiuj pagas la kotizon de izola membro kun rabato fiksita de la Estraro de B.L.E.

§ 4a — Estas bonfarinta membro ĉiu persono paginta al B.L.E. per unu fojo la sumon de 300$000, minimume, aŭ farinta al ĝi samvaloran donacon.

§ 5a — Estas honora membro ĉiu persono farinta grandvalorajn servojn al B.L.E. Tiu ĉi titolo estas donata nur dum ĝenerala kunsido.

§ 6a — Estas kunlaborantaj membroj ĉiuj personoj, kiuj, ne apartenantaj al la Ligo, faris servon konsideratan de ĝia estraro utila al la propagando de Esperanto.

§ 7a — Estas filiitaj grupoj, ĉiuj, kiuj, akceptinte tiun ĉi statuton, havas almenaŭ kvin anojn aliĝintajn al B. L. E.

Par. 4a — Ĉiu izola aŭ grupa membro, kiu dum la kuranta jaro, malgraŭ averto, ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksiĝinta.

Par. 5a — La membroj de B.L.E. apartenantaj al la kategorioj *a*, *b*, *c*, kaj *d* estas samtempe anoj de la internacia organizaĵo.

Par. 6a — B.L.E. ne enmiksiĝas en aferojn, kiuj koncernas la internan vivadon de la grupoj al ĝi filiitaj. Tiuj ĉi povas libere agadi, laŭ sia regularo kiu tamen devas esti aprobita de la estraro de la Ligo.

Par. 7a — La membroj de la Ligo rajtas:

*a*) ricevi sen plua pago la oficialan bultenon de la Ligo;
*b*) ricevi rabaton ĉe la aĉetado de libroj aŭ de aliaj publikigaĵoj eldonitaj de la Ligo.

Par. 8a — La filiitaj grupoj rajtas senpage publikigi en la oficiala bulteno informojn pri la loka Esperanto-movado.

Par. 9a — B.L.E. faras ordinarajn kunsidojn ĉiujn ses monatojn, en kiuj partoprenas la estraranoj, la izolaj, bonfarintaj kaj honoraj membroj aŭ iliaj reprezentantoj kaj la delegitoj de la filiitaj grupoj.

§ 1a — La estraranoj kaj la izolaj, bonfarintaj kaj honoraj membroj rajtas po unu voĉo.

§ 2a — Ĉiu delegito de filiita grupo havas rajton je tiom da voĉoj, kiom estas la anoj de sia grupo aliĝintaj al B.L.E. Tamen la nombro da voĉoj ne povas esti supera ol dudek.

§ 3a — La grupaj membroj povas ĉeesti la kunsidojn, diskuti proponojn, sed rajtas voĉdoni nur pere de la delegito de sia grupo.

Par. 10a — Brazila Ligo Esperantista estas direktata de estraro konsistanta el prezidanto, vicprezidanto, ĝenerala sekretario, du sekretarioj kaj kasisto.

§ sola — La estraro estas elektata dum la Brazilaj Kongresoj de Esperanto aŭ dum ordinara kunsido, se estos intertempo daŭrinta pli ol du jarojn inter du kongresoj.

Par. 11a — Al la prezidanto koncernas:

*a*) direkti la laborojn de B.L.E. kaj ĝin reprezenti en Brazilo kaj eksterlande;
*b*) provizore okupigi la postenojn vakantajn en la estraro;
*c*) nomi helpantojn en Rio-de-Janeiro, kiuj povas esti nemembro de la Ligo, kaj delegitojn en lokoj, kie ne ekzistas grupoj esperantistaj aŭ delegitoj de la internacia asocio;
*d*) kunvoki eksterordinarajn kunsidojn, kiam li opinios tion konvena.

Par. 12a — Al la vicprezidanto koncernas anstataŭi la prezidanton, kiam tiu ĉi forestos de sia posteno.

Par. 13a — Al la ĝenerala sekretario koncernas la direktado de la sekretariejo kaj precipe la redaktado de la korespondado eksterlanden.

Par. 14a — Al la unua sekretario koncernas redakti la protokolojn de la kunsidoj, helpi la ĝeneralan sekretarion por la enlanda korespondado kaj ankaŭ anstataŭi lin, kiam tiu ĉi forestos de sia posteno.

Par. 15a — La dua sekretario helpas la unuan, kiun li anstataŭos en okazo, se la unua forestos de sia posteno.

Par. 16a — Al la kasisto koncernas:

*a*) ricevi la kotizojn kaj iajn ajn mondonojn kaj subvenciojn faritajn al B.L.E. kaj prizorgi pri ĝiaj valoraĵoj,
*b*) fari la pagojn ordonitajn de la prezidanto.

## KOLONELO (AŬ KAPITANO) SERRANO

Naskiĝinte en Hispanujo li ankoraŭ tre juna veturis al Ameriko. Oni diras, ke li estis en Ĉilio kaj partoprenis la Ĉilia-Peruan militon (1895-1898) kaj servis kiel kapitano en la hispana armeo dum la milito inter Hispanujo kaj Usono (1895-1898). Kelkaj personoj diras, ke poste li loĝis en Kubo kaj aliaj, ke li enloĝiĝis en Meksikio, kie li edziĝis kaj havis infanojn. Li estas konata kiel kolonelo aŭ kapitano Serrano, kvankam lia familio estas Garcia Serrano.

Liaj gefratoj kaj genevoj loĝantaj en Argentino kaj Brazilo tre ŝatus ekscii ion pri li kaj lia familio. Informon ricevos S-ro Mario Garcia Monteiro, ĉe Brazila Ligo Esperantista, Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro. Brasil.

## BRAZILA KRONIKO

CEARÁ. — *Pereiro.* Ni legis en "O Povo", el *Fortaleza,* ke fondiĝis grupo esperantista nomata "Centro Esperantista de Pereiro", kies estraro estas la jena: Prez. — s-ro Hermes Danton Ribeiro, sek. — s-ro Joaquim Marques Fernandes kaj kas. s-ro Osorio Francisco dos Santos. Al la nova grupo ni deziras longedaŭran vivon!

PERNAMBUCO. — *Garanhuns.* Jen la nova estraro de "Grupo Esperantista Ismael Gomes Braga": Prez. — f-ino Maria do Socorro Monteiro, vicprez. — f-ino Maria Luiza Sampaio, unua sek. — f-ino Carmosina Monteiro, dua sek. — s-ro prof. Otaciano Acioli, oratoro — d-ro Osvaldo Medeiros kaj kas. f-ino Erbene Macedo.

Kunigita kun tiu grupo fondiĝis "Filatelia Grupo Esperantista *Juneco*".

MINAS GERAIS. — *São Sebastião do Paraiso.* La 12an de Aŭgusto, naskiĝa datreveno de l' fama esperantisto Carlo Bourlet, fondiĝis *"Carlo Bourlet" Esperanta Grupo,* kies estraro estas la jena: Prez. — s-ro prof. Nestor Lacerda, vicprez. — s-ro Vicente de Paula Araujo, unua sek. — s-ro Luis Anacleto de Silos, dua sek. — s-ro prof. Nelson Lacerda, unua kas. — s-ro Walter Braghini, dua kas, — s-ro Alaor Ribeiro kaj bibl. — s-ro frof. Antonio Roque Martins. Adreso: Caixa postal 94.

Ni esperas, ke la ĵus fondita grupo, al kiu ni deziras longtempan efikan kunlaboradon, baldaŭ aliĝos al nia Ligo.

*SOLVO DE ENIGMO sur paĝo* 10a.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| A | R | A | K | O |
| G | A | D | O | N |
| A | D | O | R | I |
| P | O | R | D | A |
| O | N | I | A | N |